

# lel proksimume tiom

tria interpreto de "po" kaj kelkaj aliaj vortetoj

aŭtoro Juha Metsäkallas · publikigita 2021-05-26

La origino de ĉi tiu artikolo estas la reagoj, kiujn mi ricevis pro mia artikolo *Po kiel polonio?* En la komenco de tiu artikolo mi ja cerbumas, ĉu la vorteto "po" estas rolvorteto aŭ e-vorteca vorteto. Al tio kelkaj reagis. La kialo por mia cerbumado estas la frazo de Zamenhof (mia emfazo):



- *El ĉiuj rampaĵoj de la tero laŭ iliaj specoj, **po paro el ĉiuj** eniru kun vi.*<sup>1</sup>

Se vi limiĝas je la skribita kaj tiuj du alternativoj (rolvorteto aŭ e-vorteca vorteto), vi devas konkludi, ke ĉi tie "po" ne povas esti rolvorteto, ĉar esprimo kun rolvorteto ne povas roli kiel subjekto en Esperanto. Ŝajnas, ke vi ne bezonas limiĝi tiel, ĉar estas tria interpreto.

## Rolvortetoj kiel nuanciloj

Estas kelkaj rolvortetoj, kiuj povas roli ankaŭ kiel nuanciloj al nombraj aŭ kvantaj vortoj. Tiuj estas "ĉirkaŭ", "de", "ĝis", "inter", "sub", "super" kaj nia speciala amiko "po".

PMEG havas la sekvajn ekzemplojn kaj klarigojn:

- *Restas **ĉirkaŭ** dek personoj.* = Restas proksimume dek personoj.
- ***Ĝis** ducent homoj povas eniri.* = Maksimume ducent homoj povas eniri.
- *Ili kostas **de** kvin **ĝis** dek eŭrojn.* = Ili kostas minimume kvin kaj maksimume dek eŭrojn.
- *Mi vidis **inter** cent kaj ducent homojn.* = Mi vidis minimume cent kaj maksimume ducent homojn.
- *Aranĝu ilin en du vicoj, **po** ses en vico.* = Aranĝu ilin en du vicoj, ses en ambaŭ vicoj.
- *La temperaturo estis **sub** nul.* = La temperaturo estis malpli alta ol nul gradoj.
- *Li havas **super** mil eŭrojn.* = Li havas pli ol mil eŭrojn.

Tiuj nuanciloj ĉiam staras antaŭ nombro, kiun ili modifas aŭ nuancas. Plie ilia ĉefvorto estas nur tiu nombro, do la sekva vorto havas tiun rolon, kiun ĝi logike havas tute aparte de la nuancilo. Klartekste tio signifas, ke tiu sekva vorto povas roli aŭ kiel subjekto aŭ kiel objekto.

Ni jam havis ambaŭ okazojn inter la ekzemploj supre.

kiel subjekto

- Restas **ĉirkaŭ** dek personoj.

kiel objekto

- Mi vidis **inter** cent kaj ducent homojn.

Kelkfoje la nombro estas subkomprenata kiel en la Biblia citaĵo supre:

- El ĉiuj rampaĵoj de la tero laŭ iliaj specoj, po paro el ĉiuj eniru kun vi.

kie oni devas kompreni la esprimon "po paro el ĉiuj" kiel "po unu paro el ĉiuj", t.e. "po" modifas nur la subkomprenatan nombron "unu" kaj "paro" rolas kiel subjekto en la dua frazo.

## La hezito

Se vi opinias, ke tiuj vortoj ĉiam estas veraj rolmontriloj, ne uzu la rolfinajon *-n* post tiuj vortoj, sed tiam vi devas rigardi la Zamenhofan citaĵon kiel eraran. Se vi tamen opinias, ke tiuj vortoj estas rolmontriloj, kiuj povas roli ankaŭ kiel nuanciloj, uzu la rolfinajon *-n* laŭ bezono. Ĉu oni rigardas tian nuancilon kiel e-vortecan vorteton aŭ ne, estas plejparte sendiference, ĉar tio solvas la problemon.

Kiam mi jam en la antaŭa artikolo konstatis, eĉ Zamenhof mem hezitis pri la afero kaj uzis la vortetojn dumaniere. Li agnoskas ĉi tiun heziton en *Lingva respondo n-ro 79*, en kiu li konstatas, ke ambaŭ manieroj estas uzeblaj kaj bonaj, kaj finas sian respondon per "ĉie, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon". Eble tiu lasta komento kaŭzis, ke multaj fruaj Esperantistoj elektis la "sekuran" alternativon, sen *-n*, sen pensi, kiujn problemojn tio kaŭzos.

Sed Esperanto evoluis kaj establiĝis, kaj miaopinie tiu klarigo de PMEG kun la koncepto pri "nuancilo", bone solvas la problemon.

## Rimarko al la finnaparolantoj

Kiam oni komparas al la finna, notu, ke el la nuanciloj nur "sub" kaj "super" tradukiĝas al prepozicioj en la finna - la aliajn oni esprimas per kazoj aŭ per adverbaj nuanciloj. Plie notu, ke la nombroj (kune kun substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj) apartenas al la nominoj, kio havas la konsekvencon, ke ili povas senprobleme roli kiel subjektoj kaj kiel objektoj.

Alie estas kun la vorto "po". Depende de la kunteksto oni povas traduki ĝin ekzemple per adverba kazo: "po paro el ĉiuj", (*kaikkia*) *pareittain*. Esprimoj kun adverbaj kazoj ne povas roli kiel subjekto en la finna. Oni devas esprimi la aferon alimaniere, ekzemple tiel kiel oni faras en la oficiala traduko de Biblio de la jaro 1992 (mia emfazo):

Ja kaikkia elollisia sinun tulee ottaa mukaasi arkkiin **kaksi, uros ja naaras**, että ne säilyisivät hengissä sinun kanssasi. – 1. Mooseksen kirja 6:19 (KR92)

Tio lautas: "El ĉiuj vivantaj... prenu kun vi **du, vira kaj ina**, por ke..."

Posted in artikoloj, Esperantlingvaj | One Comment »

[https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/ed/Sakura\\_Sakura.song.ogg](https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/ed/Sakura_Sakura.song.ogg)  
Upotus Wikimediasta CC BY-SA 3.0 -lisensillä

Vaikka sana Vocaloid alunperin tarkoitti pelkästään mainittua Yamahan-laulusyntetisaattoria, sanan merkitys on muuttunut ohjelmistoon usein liitettyjen visuaalisten elementtien myötä. Nykyään vokaloidilla, esperantoksi *vokalojdo*, tarkoitetaan hahmoa, joka esittää laulusyntetisaattorilla tehtyjä lauluja. Koska ilmiö on lähtöisin Japanista, hahmot ovat yleensä animea. Tunnetuin hahmo on japanilaisen Crypton Future Media -yhtiön kehittämä turkoosilettinen tyttö HATSUNE Miku (ミク), "ensimmäinen ääni tulevaisuudesta").

Hatsune Mikun äänipankki on luotu ääninäyttelijän FUJITA Sakin (フジタ サキ) esittämistä japanin ääninäytteistä. Olen pariin kertaan ihmetellyt suomen ja japanin äännejärjestelmän samankaltaisuutta, mistä osoituksena olkoon Hatsune Mikun esittämänä suomalainen kansansävelmä Ievan polkka, joka pohjautuu kansanmusiikkiyhtye Loituman vuonna 1996 tunnetuksi tekemään versioon<sup>1</sup>. Jo Loituman versiossa osa sanoista oli korvattu mitään tarkoittamattomilla äänneillä, Mikun versiossa oikeista sanoista ei ole jäljellä mitään, mutta silti se kuulostaa jonkinlaiselta suomelta:

Upotus Youtubesta, ks. tekijänoikeustiedot sieltä

Hatsune Miku on suuren luokan poptähti, joka on ollut Japanin lisäksi kiertueella Hong Kongissa, Kiinan tasavallassa, Singaporessa ja Yhdysvalloissa. Luonnollisesti Hatsune Mikulla on oma [Youtube-kanava](#) (n. 1,5 miljoonaa tilaajaa), ja verkosta löytyy kokonaisia konserttitaltiointeja. Selvyiden vuoksi kerrottakoon, että Miku esiintyy konserteissa ihmisorkesterin kanssa.

"Huono omena" on japanilaisesta tietokonepelistä peräisin oleva laulu. *Tōhō Project* (トホ) on harrastelijoiden tuottama räiskintäpelisarja, jonka neljäs osa *Tōhō gensōkyō* (トホ幻想郷), "Fantasiamaa", vuodelta 1998 sisältää laulun nimeltä "Huono omena". Laulua ryhdyttiin esittämään erikseen, ja se saavutti Japanissa suuren suosion niin, että erilaiset artistit ovat ottaneet omat versionsa ohjelmistoihinsa. Olen törmännyt internetissä esim. perinteisin soittimin – kotoin, samisenein, nokkahuiluin ja rummuin – esitettyyn versioon sekä tietenkin pariin suomenkieliseen käännökseen<sup>2</sup>.

Hatsune Miku -ohjelmisto on ostettavissa. Uusimman version hinta näkyy olevan noin 140 euroa.

Niinpä joku innokas on laittanut Mikun laulamaan esperantoksi<sup>3</sup>. Tekijä kyllä myöntää, ettei ole opiskellut esperantoa ja sen valitettavasti huomaa – ja ilmeisesti partituurimuokkaimenkin käyttö jättää toivomisen varaa. Käännös on karmean huono<sup>4</sup>, mutta arvioikaa itse, miltä kuulostaa kovaa ja korkealta laulettu j-pop edes jonkilaiseksi esperantoksi!

PS. Äänisynteesin tekniikka on kehittynyt valtavasti noista edellä kuulluista esityksistä. Sekä Sakura-laulu vuodelta 2009 että Ievan polkka vuodelta 2011 kuulostavat varsin muovisilta verrattuna uusimpiin esityksiin. Esimerkkinä uudemmassa tasosta käyköön mainitun Crypton Future Media -yhtiön Kaito-vokaloidin (カイト) vuonna 2014 julkaistun version demo, jossa on käytetty erikoistehosteita. Koko laulu on luotu tietokoneella.

[https://ec.crypton.co.jp/download/demosong/vocaloid3/kaitov3demosong03\\_whisper\\_wandarap.mp3](https://ec.crypton.co.jp/download/demosong/vocaloid3/kaitov3demosong03_whisper_wandarap.mp3)  
Upotus Crypton Future Media -yhtiön sivustolta, © Crypton Future Media, INC.

Posted in [artikoloj](#), [finnalingvaj](#) | [No Comments](#) »